

Kunsidoj normale okazas ĉiumonate ĉe Espace Dickens, rue Dickens 6, Laŭzano

Venontaj kunsidoj:

- Sa, la 22-an de junio
Ekskurso en Courtelary
- Lu, la 2-an de septembro
Libro-prezento
- Lu, la 7-an de oktobro
Decidota
- Lu, la 4-an de novembro
Decidota

Lunde, la 6-an de majo, je la 20-a Venu kune kanti karaokeaĵojn.

Sur la ekrano aperos la tekstoj de la kanzonoj, kiujn vi povos legi, lerni kaj kanti.

La Prezidantino nin alparolas ...

Dum antaŭa lunda kunsido ni plezure aŭskultis nian novan membron, Stefano Keller. Kiel ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, li partoprenas tie ĉiujare – foje kun iuj el siaj teamanoj - diversajn eventojn, interalie la Forumon pri Minoritatoj traktanta kulturojn kaj lingvajn rajtojn.

Stefano, dum studado en Hungario, mem eklernis Esperanton en la 70aj jaroj ĉar li interesiĝas pri popoloj. Ekde tiam li multe laboras en Esperantujo, ekzemple kunlaborante en CDELI, i.a. pri ties retejo, pri la katalogado de libroj kaj aliaj taskoj.

Ĉijare indiĝenaj lingvoj estas en la fokuso de pluraj filmoj. Mi vidis la premiitan turkan filmon de C. Zencirci kaj G. Giovanetti ankoraŭ videbla en Ĝenevo. Tiu duopo interesiĝas pri lingvoj kaj komunikiloj kaj uzas verajn informojn en siaj fikciaj filmoj: Sibel loĝas en montara vilaĝo en la nordorienta parto de Turkio. Ŝi ne plu komunikas parolante post emocia ŝoko. Anstataŭe ŝi uzas la malnovan fajfatan lingvon kiun oni uzadis en la regiono por komuniki inter valoj. Ĝi estas rekta transskribo de la

turka lingvo, ĉiu silabo havas sian fajfon.

Similaj fajfataj lingvoj estas uzataj, aŭ bedaŭrinde ofte ne plu uzatas, en aliaj lokoj kiel Pireneoj au Kanarioj, ĉar ili estas aŭdeblaj je grandaj distancoj.

Ankaŭ nia klubo verkas novan filmon pri *Sekreta Vilaĝeto* en la montaro, en kiu ĉiu parolas nian internacian lingvon kiel rimedon kontraŭ malnovaj kvereloj. Partoprenu ĉi tiun sperton. Informoj sekvos dum la sekvontaj monatoj.

Maryse

Laŭzana Esperanto-Societo

pa. F. Randin, ch. de la Vallombreuse 14
CH - 1004 Lausanne
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
facebook.com/esperantolausanne
youtube.com/esperantolausanne
dailymotion.com/esperantolausanne
poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

Komitato 2019

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto; Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

La komitato informas

La babiladaj rondoj je la 19-a

Ambaŭgrupe:

ve, la 17-an de majo
Monika kaj Giulio invitos nin en
Espace Dickens



doodle.com/poll/8dk45bkb8brdf2nd

Okcidente:

ve, la 31-a de majo ĉe Rosario
Scopelliti, ch. de Barberine 6
à 1004 Lausanne
021 648 76 44 / 079 264 41 08



doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

Oriente:

ve, la 24-an de majo ĉe Anne-Marie Ramel, ch. des Murets 6
à 1814 La Tour-de-Peilz
021 944 23 84



Ekskurso 2019

Vizito kaj manĝo en la firmao
Camille Bloch en Courtelary
sa, la 22-an de junio.

Prezo: CHF 25.-
Ĉiuj pagas sian trajnan bileton.
Foriro trajna el Laŭzano: 8h15
Reveno al Laŭzano: 17h45

Karlo de Edmond Privat

Kvara Ĉapitro: *Dimanĉo*

TO	RAN	PE	ES
PO		NO	TI
LO	I		ĜO
GI-O	NER	E	
	TO	DI	KRE
A		PA	O
DI	PEN		DA
PO	SU	MAT	TO

SILABA KRUCVORTENIGMO

Dimanĉe matene Karlo restis longe en sia liteto kaj ĝuis la dolĉajn sonĝojn, kiujn alportas la oraj sunradioj, enirante en la ĉambiron inter la kurtenoj de l' fenestro . . . Subite li ekvidis la dolĉan vizaĝon de sia patrino, alveninta por lin vekti. Li estis tre gaja. Laŭte sonoradis la sonoriloj de l' preĝejoj, dum lia patrino lin helpis por lia tualetto.

Karlo opiniis, ke la spongoj estas tre malagrablaj objektoj, kiuj metas sapon en liajn okulojn. Li jam ofte konigis tiun impreson al sia patrino, sed ŝi tamen daŭrigis la uzadon de spongoj.

Dimanĉe S-ino Davis vestis Karlon per brodita flanelĉemizeto, blanka pantolono kaj blua jaketo. Li havis flavajn ŝuetojn kaj grandan pajlan ĉapelon, pri kiu li estis tre fiera.

Dimanĉe posttagmeze Karlo promenadis kun sia patro. Li ŝatis iri al la bordo de l' rivero por vidi la ŝipojn kaj la fiŝkaptistojn, kiuj estis

tre multaj. Estis seriozaj sinjoroj, longbarbaj maljunuloj kaj ankaŭ multaj knaboj. Ĉiu silente sidis sub unu el la arboj apud la bordo. Ili pacience rigardadis la fadenon de sia fiŝkaptilo malaperantan en la akvo. De tempo al tempo iu levis subite sian kanon kaj dekreĉis de la hoko brilantan fiŝon, malespere saltantan ĉiuflanken.

Antaŭ la vespero S-ro Davis kaj lia fileto revenis hejmen, kaj alvenis ĝustatempe por trinki varmegan tason da teo en la salono.

Ofte la avo kaj onklo Jako vizitis ilin dimanĉe kaj ĉiuj vespermanĝis kune.

La onklo Jako kelkafoje alportis sian fonografon, kaj Karlo aŭdis mirindajn kantojn kaj muzikaĵojn. Iam onklo Jako diris ŝerckanteton antaŭ la granda buŝo de l' fonografo. La maŝino ripetis la kanton poste kaj eĉ la ridegon de l' avo kaj de l' patro. Onklo Jako klarigis, ke la fonografo ripetus, kion

ajn Karlo dirus antaŭ la maŝino, sed Karlo ne kuraĝis ion diri. Li jam opiniis, ke ofte estas tre saĝe silenti.

Karlo tre ŝatis sidi sur la genuoj de sia avo kaj aŭdi rakontojn pri la infaneco de sia patreto aŭ pri malproksimaj landoj, kiujn la avo vizitis. Li ŝatis aŭdi pri la maro, kaj tre deziris ĝin iam vidi.

Kiam estis bela vetero, la tuta familio sidis en la ĝardeneto. La avo prenis sian pipon, ĝin plenigis per tabako kaj ĝin ekbruligis. La patro kaj la onklo fumis nur cigaredojn. Karlo tre malŝatis la tabakfumon, kiu doloris liajn okulojn. Li ofte demandis sian patron, kial la viroj fumas; kaj la patro ĉiam respondis: "por la plezuro". Karlo decidis, ke li trovos pli agrablan plezuron, ol fumadi, kiam li estos viro. Sed kiam lia avo diris al li, ke ĉiuj maristoj fumas, li ekŝanĝis sian opinion.



Silaba krucvortenigmo

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonaj silaboj:

A, DA, DI, DI, E, ES, GI-O, ĜO, I, KRE, LO, MAT, NER, NO, O, PA, PE, PEN, PO, PO, RAN, SU, TI, TO, TO, TO.

1	2		3	4	5
6		7			
	8			9	
10			11		

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Komenciĝo, starto; 3. Dato de kreaĵo; 6. Klopodo, strebo; 7. ___ komplekso (Freud); 8. En fiziko, estas la rezisto de korpo al ŝanĝo de sia movkondiĉo; 9. ___ tutmonde, agu loke; 10. Branĉo de matematiko kiu studas la nociojn de kontinueco kaj konekseco; 11. Animala graso.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. La plej disvastigita internacia planlingvo; 2. Kontenero en la vitkultivado por kolekto de la vinberoj; 3. Agnosko, bonhavo; 4. Kolektiva; 5. Ruĝa supo; 7. La E de $E=mc^2$; 8. Internacia Labor-Oficejo; 9. Esti alligita per unu ekstremo.